

☺ **DIVENU!!!** ☺

1)

En mia ĝardeno falas duoble pli da neĝo ol en la ĝardeno de la najbaro. Kial?

2)

Mia 1a parto estas numero

Mia 2a parto indikas homon

Mia tuto estas via *vid-ilo*

3)

Tra unu truoj oni eniras kaj tra du truoj oni eliras. Kio ĝi estas?

4)

Mi parolas ĉiujn lingvojn, sed neniun mi konas. Kiu mi estas?

5)

Kiom pezas la tero, kiu troviĝas en kvadrata truoj, fosita en la tero, kies profundeco estas 1 metro kaj kies diametro estas la du trionoj de la profundeco?

6)

Kiu kapablas salti pli alten ol la Turo Eiffel?

7)

Kio kreskas malantaŭe kiam oni malkreskigas ĝin antaŭe?

8)

Mia unua parto estas radiko de malgranda griza besto (kiun manĝas kato)

Mia dua parto estas korpo-parto sub la kapo

Mian tuton havas ĉiu, kiu estas forta

9)

Mia 1a parto estas radiko de ne malseka

Mia 2a parto havas multajn truojn (uzas ĝin fiŝkaptistoj)

Mian tuton diru al neniuj, ĉar ĝi estas ...

10)

Mia 1a parto estas radiko de ekzemple A, Bo, E, Ko, ...

Mia 2a parto estas la unua elemento en la aboco

Mia 3a parto estas mallarĝa, alta konstruaĵo

Mia tuto estas la scienco de poemoj, noveloj, fabeloj, romanoj, dramoj, ...

Solvoj:

- 1) *ĉar la mia estas duoble pli granda*
- 2) *okulo*
- 3) *pantalono*
- 4) *eĥo*
- 5) *Neniom, ĉar en la truo ne estas tero.*
- 6) *Ĉiuj, ĉar la Turo Eiffel ne saltas.*
- 7) *la vojo*
- 8) *muskolo*
- 9) *sekreto*
- 10) *literaturo*